

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 15 fkoj
Bonfara : 20 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

JANUARO - FEBRUARO

1975 1

KULTURAJ KAJEROJ

1975 JANUARO - FEBRUARO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Romana akvedukto en suda Francio :
La advedukto de Nimeso S. Humm

La indiĝenaj rasoj de Ameriko E. Motillon

Prelegoj de Grésillon :
« Homo kaj maŝino »
— **La laboro de la tranĉil-metiistoj tra la tempoj**
— **Thiers**
Kristos patro kaj filo

— **Har-foiro**

— **Dento-doloro** Bukar

— **Por via distro**

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatika demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn kaj kritikojn.

El Grésillon

Kiom da gesamideanoj vizitos Gresillon ĉi jare ? Tio ne estas divenludo. Kiel lastjare la aliĝoj venas gut-post-gute. La eksterlandoj ĝenerale prefere venas dum la tiel titolitaj Internaciaj Semajnoj ĉar ili opinias, ke la aliaj periodoj ne estas internaciaj. La ĉefa diferenco estas, ke dum la Internaciaj semajnoj okazas prelegoj kaj debatoj sed dum la aliaj, kursoj kaj organizitaj konversacioj. Al tiuj, kiuj timas ke la prelegoj estos lingve tro altnivelaj por ili ni respondos ke oni lernas esperanton ankaŭ tra la oreloj eĉ se oni ne povas, almenaŭ ĉe la komenco, vigle partopreni en la diskutoj. Al tiuj, kiuj timas, ke dum la aliaj periodoj, la kurs-periodoj, ĉeestos tro da francoj, ke la etoso ne estos sufiĉe internacia ni respondos, ke la ĉeestantaro estas diversnacia nur, kiam diversnacianoj ĉeestas, se la eksterlandanoj hezitas veni ni rondiras kaj ne trafas la celon. La etoso fariĝos ne pure franca nur se amikoj el trans la limoj venos. Kaj trankviliĝu amikoj, lastan jaron, dum la kurs-periodoj ĉeestis gesamideanoj el Usono, Aŭstrio, Pollando, Malagaŝa Respubliko, Nederlando, Britujo, Hispanio, Venezuelo, Danlando, Portugalujo, Koreujo... kaj Francujo. Tre ofte niaj kursoj, diversnivelaj, okazas antaŭ lernantaro diversnacia.

Konklude neniu periodo estas rezervita al la francoj. Se kelkafoje estas pli da francoj ol da eksterlandanoj la kaŭzo estas nur ke la eksterlandanoj ne venis sufiĉnombre ĉar ili timis, ke la periodo ne estos sufiĉe internacia. Vidu kiel komplika estas la problemo... kaj simpla la solvo. Ne dependas de ni, ke la eksterlandanoj ŝajne ne ŝatas ĉeesti kursojn ! Ili nur pensu, ke la kursoj ne estas devigaj.

Do, ni atendas ĉiujn, el iu ajn lando, dum iu ajn periodo por ripozo, kurso-ĉeesto, prelegĉeesto aŭ promenado. Ju pli da eksterlandanoj, despli internacia la etoso.

Por plezurigi vin aŭ la aliajn

okaze de la finjaraj festoj

CENTJARDAŬRA
ESPERANTA KALENDARO

Eleganta sur via skribotablo
Praktika en la uzado
ebligas trovi iujn ajn datojn de la jaro 1900 ĝis la jaro 2000

dimensioj : 10,5 × 16 cm.

Prezo : 50,00 fr. fr. + 10 % por afranko



Esperanto tra la Mondo ★

LA UNIVERSALA KONGRESO EN KOPENHAGO

— La ĉefa temo de la kongreso, kaj sekve ankaŭ de unu el ĝiaj ĉefaj laborkunsidoj, estos « La Virino », okaze de la Internacia Jaro de la Virino (proklamita de U.N.). Krome estas elektita dua temo : « La rolo de la individuo en la Esperanto-movado ».

— Pro la longeco de la pasintaj inaŭguraj kunvenoj, la programo estos, tiujare ,dismetita en du partoj (matene kaj posttagmeze).

SEMINARIO EN LA USONA MODERNLINGVA ASOCIO

La kongreso de Modern Language Association kunvenis en Nov-Jorko de la 26a ĝis la 29a de Decembro.

Por la tria fojo, okazis en ĝia kadro la seminario « Esperantaj lingvo kaj literaturo » kaj, por la tria fojo, la seminario « Interlingvistiko ».

La interesiĝo de ĉiam pli multaj lingvistikoj, pedagogoj, kaj literatur-esplorantoj en Usono, pri la problemoj de internacia lingvo estas tre certe aparte grava.

INTER SARAJEVAJ LINGVISTOJ

La Sarajeva Lingvista Rondo dediĉis unu el siaj regulaj sesioj, dum decembro, al Esperanto. Okazis duhora debato kaj la lingvistoj interesiĝis multe pri la temo : « Fenomeno Esperanto » ; ili estis aparte impresitaj de la revuo « La Monda Lingva Problemo » kun siaj artikol-resumoj en Esperanto.

Jen formo de agado, kiun ni devus provi disvolvi en la lingvistikaj kaj beletraj fakultatoj de la universitatoj, kun la prezento de seriozaj ekspozicioj kaj la partopreno de kompetentaj esperantistoj....

SOMERA UNIVERSITATO EN HUNGARIO

La tradicia Somera Esperanto-Universitato en Gyula (Hungario), okazos de la 6a ĝis la 12a de Julio, kun riĉa programo. Adreso : Somera Esperanto-Universitato, Sts. 48-as 11, H-5700, Gyula, Hungario.

TRI INICIATIVOJ NEPRE SUBTENENDAJ DE LA KONCERNATOJ...

— **Inter la socialistoj :** Oni jam scias ke la itala socialista partio oficiale proponas al la socialista internacialo subteni kaj uzi Esperanton. Pro tio, la itala partio sendis dulingvan broŝuron al la aliaj socialistaj partioj por ekspliki sian iniciativon. Ĝi projektas aranĝi en Romo, dum Septembro 1976 ,la unuan internacian renkonton de esperantistaj socialistoj.

Tiuj lastaj, krom interveno en siaj propraj partioj, estas invitataj rapide rilati kun Alberto Manebene, via Monti Sibillini 3, I-00141 Roma, indikante nomon, adreson, aĝon, eventuale profesion kaj telefonnumeron.

— **En sindikatoj :** « Hungara vivo » publikigas intervjuon de S-ro Sandor Gaspar, ĉefsekretario de la hungara landa konsilio de la sindikatoj. S-ro Gaspar anoncis ke li estas preta aktive subteni Esperanton en la sino de la Sindikata Mondligo, substrekante la gravecon de la internacia lingvo por la laboristoj.

Konvenus do ke la anoj de tiu sindikata tutmonda organizo, al kiu apartenas la orienteŭropaj sindikatoj (en Francujo, ekz. C.G.T.), salutu Sandor Gaspar (a Magyar Szakszervezetek Orszagos Tanacsanak fotitkara. H. 1415 Budapest, VI, Dozsa Gyorgy ut 84/b Magyarorszag, Hungario), kaj samtempe konigu la deklaron de S-ro Sandor Gaspar al la ĉefsekretario de sia landa sindikata centro.

— **Inter la skoltoj :** Seriozaj klopodoj estas faritaj de la esperantistaj skoltoj por antaŭigi la uzadon de nia lingvo en la oficialaj manifestacioj de la skoltoj.

Skolta Esperanto-Ligo publikigas bultenon kaj havas reprezentantojn en multaj landoj.

Se tiu « fako » koncernas vin, rilatu kun tiuj naciaj delegitoj aŭ kun la sektretario : Sro J.K. Hammer, Taxusstraat 7, Zaandam, Nederlando.

La Ligo grupigas skoltojn de ĉiuj tendencoj.

EN BRITA ENCIKLOPEDIO

La 15a eldono (1974) de « Encyclopedia Britanica », enhavas bonan tekston pri Esperanto kaj taŭgajn informojn pri la gramatiko, la disvastiĝo de la lingvo, pri Zamenhof kaj pri la haveblaj libroj. La artikolon verkis Norman A. Mc Quonun, profesoro de antropologio kaj lingvistiko ĉe la Universitato de Chicago.

TURISMA ESPERANTO-FOIRO EN POLLANDO

Lastjare okazis en Bydgoszcz (Pollando), la unua Turisma Esperanto-Foiro kun partopreno de diversaj esperantistaj respondeculoj. Pluraj interkonsentoj estis subskribitaj por interŝanĝo de esperantaj grupoj de la orienteŭropaj landoj. Krome, dum la somero 1975, ĉiusemajne startos aŭtobusoj el Pollando por ekskursoj al Budapeŝto kaj al Sofio, Plovdiv, Pisanica.

Ankoraŭ imitinda iniciativo !

KIEN VI IROS SOMERE ?

— Kongreso de S.A.T., en Hago, Nederlando (26.7 - 2.8). Antaŭkongreso en Haarlem (19 - 25.7) ; postkongreso en Hengelo (2 - 9.8). Adreso : S-ro J. Kuijpers, Lombardkade 85-b, Rotterdam 3001.

— Internacia kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I.K.U.E.), en Romo (11 - 16.8). Adreso : P. Giacinto Jacobitti, Piazza S. Maria Maggiore 8, 00185 Roma.

— Internaciaj Feriaj Esperanto-kursoj, en Helsingor, Danlando (20 - 26.7). Adreso : Eva Langkilde, ingemannsveg 18, DK3000, Helsinger.

— Eŭropa Feriosemajno en Svislando (31.8 - 6.9), en Furigen, apud Stansstad, ĉe Vierwaldstatte-lago. Adreso : S-ro Ernst Glattli, Lamstrasse 17, CH-5200 Brugg, Svislando.

— Internacia Esperanto-Semajno, en Kromenie (Nederlando). (3 - 10.8). Adreso : B.v.d. Pol, Teresjkovastraat 15, Krommenie.

ROMANA AKVEDUKTO EN SUDA FRANCIO :
la akvedukto de Nimeso (Nîmes)

Oni scias, ke Romanoj ĉiam konsideris tre grava la problemon de akvo : ĉie ili serĉis altkvalitajn akvojn por abunde provizi siajn urbojn, eĉ malgrandajn. Kompreneble tio starigis al ili seriozajn problemojn por **trovi, konduki** kaj **distribui** tiun akvon tiel necesan por grandaj urboj.


Post la konkero de Gallio fare de la soldatoj de Julio Cezaro, la urbo Nimeso (Nîmes) fariĝis unu el tiuj grandaj Romanaj urboj ,unu ei la plej brilaj civitoj. Se la gallia urbeto naskiĝis dank'al **la fonto Nemaŭsus**, estas certe ke ties elfluokvanto estis tute ne sufiĉa por la Romana urbego.

Estis do necese serĉi en la ĉirkaŭaĵo, fonton, kiu kompletigus tiun de Nîmes. Oni pensis momenton pri la rivero Gard, sed oni trovis pli bonan :

Proksime de Uzès, Romanoj malkovris fonton, kiu respondis per siaj kvanto kaj kvalito al iliaj deziroj : **la fonto de l'Eure.** Ĝi elteriĝas ĉe la piedo de kalka altebenaĵo kaj, neniam oni vidis ĝin senakva. Eĉ meze de somero, eĉ post longa periodo de sekeco, ĝia elfluokvanto restas konstanta kaj tre abunda : 30 000 m3 tage. Post kiam oni trovis akvon, estis necese solvi la problemon de **la kondukado de Uzès ĝis Nîmes.** Ĉar la fonto situas sur la alteco de 76 m super la nivelo de la maro kaj Nîmes je 59 metroj, estas nur 17 metroj de niveldiferenco ; sur tuta distanco de 49 km, la meza deklivo de la akvedukto estas do 34 cm/km. Tial la entrepreno ŝajnis malfacila, sed la Romanoj ne povis rezigni la projekton. Ili do uzis ĉiujn teknikajn eblecojn : jen en **tranĉeoj,** jen **sur muro, sur arkaĵoj,** jen **tra tuneloj** fositaj en roko, jen **sub tero,** la akvedukto serpentumis tra la kamparo. Sed restis grava malfacilajo :

pasigi la akvon super la rivero Gard.


Por Romanoj nenio estis neebla : ili decidis ke la akvedukto transpasos la riveron per arta konstruaĵo, kiun ni erare nomas « **Pont du Gard** » (Ponto super Gardo).



Ponto super Gardo, la plej bela parto de la akvedukto


273 metrojn longa, 49 metrojn alta, ĝi konsistas el tri etaĝoj, el kiuj la plej alta estas la akvedukto mem. Tute konstruita el tranĉitaj ŝtonegoj eltiritaj de ŝtonminejo (ankoraŭ ekspluatata), ĝi baldaŭ estos 2000 jara. La **kanalo** mem estis tute masonita, kovrita per **slaboj** ; en kelkaj lokoj oni povas ankoraŭ vidi ruĝajn spurojn de netralasiva ŝmiraĵo, sed jarojn post jaroj, kalkaj sedimentoj akumuliĝis sur la vandoj.

Tiamaniere Nimeso ricevis akvon de Eure dum 400 jaroj. Ĝi alvenis norde de la urbo en « **Castellum divisorium** » tra rektangula aperturo ; la cirklaj truoj dividis



« Castellum divisorium » en Nîmes tie alvenis la akavo de la akvedukto

ĝin kaj **konduktuboj** distribuis ĝin en la diversajn kvartalojn. Bedaŭrinde la jarcentoj, sed precipe la homoj detruis tiun admirindan majstroverkon, kies restaĵojn oni devas serĉi tra la kamparo. Tamen, spite al la jarcentoj, la « Ponto super Gardo » daŭre vekas admiron de vizitantoj kaj respekton por la genio de ĝiaj konstruistoj.



P.S. — Tiu teksto akompanas serion de diapozitivoj (24) pri la temo ; tiujn diapozitivojn oni povas prunte ricevi. Bonvolu turni vin al :

S-ino HUMM
Chemin des Neuf-Peyres,
84000 Avignon (Francujo)

LA INDIĜENAJ RASOJ DE AMERIKO

Je la fino de la 15a jarcento, Kristoforo Kolombo, spite preskaŭ ĝeneralan opinion, kredis pri la sfereco de la tero. El ĝi li deduktis, ke travelado al Hindio tra la Atlantika Oceano estus permara rekta vojo, pli facila kaj tre malpli longa ol la ĉirkaŭnavigado ĉirkaŭ Afriko preter la kabo de Tempestoj, nun nomata kabo de Bonespero. Plie, li esperis, ke alveno en Hindio sur nekonata kaj neesplorata marbordo trovigos al li grandegajn riĉaĵojn, kiel estis kredinde pro la multaj rakontoj, fabloj, kaj legendoj raportitaj de la navigistoj.

Je la jaro 1492a, post multaj klopodoj en Francio, Italio, Portugalio, Hispanio, li fine ricevis de la reĝo de Kastillio, la necesan helpon por sia aventurema entrepreno.

La rezultoj superis liajn esperojn. Je lia alteriĝo, li estis akceptita kun ĉiuj honoroj ŝuldataj al la granda Dio blanka, Kŭetzalkoatl, kies revenon anoncis la profetaĵoj. Li ja ne trovis la spicojn kaj ŝtofojn tiom aprezatajn en Eŭropo, sed li eltrovis abundon de oro, arĝento, kaj gemoj. Tiuj « Indianoj » ne tre aprezis oron, kaj ĝi ne estis por ili rimedo por interŝanĝoj. Sed ili malavare uzis ĝin por ornamaĵoj, kultaj objektoj, juveloj, kaj eĉ tegis per ĝi la murojn de siaj temploj kaj palacoj.

La maristaroj de Kristoforo Kolombo kompreneble konsistis el aventuristoj avidaj pri riĉiĝo, kaj Kolombo mem ne havis alian celon. Lia reveno en Hispanio naskis multajn deziregojn en ĉiuj medioj, unue ĉe la reĝo. Ekspedicioj estis organizitaj, laŭdire por « civilizi » tiujn konsideratajn kiel « sovaĝulojn », sed verdire, por akiri fortunon, rabante per ĉiuj rimedoj la fantastajn riĉaĵojn abundegajn en la « Nova Tero ». Do, ni ne devas miri pri la masakroj kaj genocidoj elfaritaj de la unuaj invadintoj. Ja, la Eklezio vidis en tiu nova lando kampo por evangelizado, kaj sendis misiistojn. Sed ĉi tiuj — krom kelkaj raraj esceptoj — estis infektitaj de la frenezo pri oro... Ĉar ili havis nur malestimon por la « sovaĝuloj », kiujn ili konsideris pli kiel bestojn ol kiel homojn, ili ne estis malpli kruelaj ol la soldatoj. Cetere, ĉu ili povis esti pli humanaj ol la Eklezio mem estis humana en Eŭropo ? Mi ne volas emfazi tiun nevišeblan makulon de nia civilizo : tio ne estas la celo de tiu artikolo. Mi nur rimarkigos, je tiu okazo, ke la alfluo de oro kaj arĝento en Hispanio kaj Portugalio kaŭzis senegalan ekonomian krizon, kaj apenaŭ unu jarcenton poste, tiuj du landoj, kun sia tuta oro, fariĝis la du plej mizeraj nacioj en Eŭropo. Kaj ankoraŭ nuntempe, ili luktadas por retrovi sian forperditan prosperon.

Post nelonge, rezultis el la ekspedicioj al « Okcidenta Hindio », ke Kolombo estis eltrovinta grandegan kontinenton, limigitan okcidente de la Atlantika Oceano, oriente de la Pacifika oceano, norde kaj sude de la polusaj glacioj. Tiu nova kontinento ricevis la nomon de alia aventuristo *Americo Vespucius* kaj estas konata kiel Ameriko. La nomo de la eltrovinto estis donita al Hispana kolonio, Kolombio, sendependa respubliko ekde 1818.

Oni surprize konstatis, ke tiu vasta kontinento sepdekoble pli granda ol Francio, estas preskaŭ senhoma. Dividita en du partoj interligitaj de mallarĝa terstrio, la istmo de Panamo, ĝia norda parto estis loĝata de ne multhomaj gentoj. Ili konsistis el belaj homaj tipoj, ĝenerale altkrestaj, kun kupreca haŭtkoloro kaj abunda nigra hararo. Tiuj gentoj vivis kiel nomadaj triboj, ĝenerale en tendoj, praktike izolaj. Iliaj rilatoj kun najbaraj triboj estis preskaŭ nur konstanta milito. Iliaj armiloj konsistis el la milithakilo, la pafarko, kaj la sagoj. Ili estis nomitaj « Ruĝhaŭtuloj » pro ilia bronzeca haŭtkoloro, kaj pro la ruĝa koloro per kiu sin pentris la militantoj. Ili tute ne similis la popularan bildon kreitan de la romanoj de Fenimore Cooper kaj Gustave Aymard, de la Usona kinematografo kaj de la literaturo « Western ». Ili ne rajdis impetajn bestojn ; ĉevaloj ne ekzistis en Ameriko. Oni povas diri, ke la Hispana konkero estis ebligita de la ĉevaloj kaj fusiloj. Tiu homa raso estas preskaŭ malaperinta depost la koloniigo de Ameriko. La lastaj restantaj triboj preskaŭ senhomigitaj de la invadintoj, estis forpuŝitaj en pli — malpli vastaj « Rezervlandoj », kie ili pli kaj pli malpliiĝas. En Kanado, la gento de la Algonkoj estas praktike malaperinta. Sed pro asimiliĝo, la unuaj francaj kolonianoj amikiĝis kun la indiĝenoj, kaj eĉ edziĝis je la « Ruĝulinoj ». La mestizado rezultigis homojn nomitajn « Brulitaj-Lignoj » pro ilia haŭtkoloro, kaj ili kunfandiĝis kun la unuaj generacioj de la Francaj Kanadanoj.

Ĉe la Ekstrem-Nordo de Ameriko, la polusa regiono estis loĝata de triboj de fiŝkaptistoj, la Eskimoj originaj el Azio, ankoraŭ ekzistantaj. La sudo de Nord-Ameriko, Meksikio, Jukatano, Florido, Kalifornio estis loĝata de izolaj triboj, ignorantaj unu la aliajn ; escepte Meksikion, kiu estis prospera ŝtato, multhoma kaj tre riĉa, la Aztekoj.

Sudameriko surkovrita de profundaj praarbaroj ŝajnis loĝata nur en la parto proksima al la istmo de Panamo kaj en la marbordaj regionoj de ambaŭ oceanoj, kie kelkaj triboj atingis realan civilizon. La plej suda parto, disigita de la antarktaj glaciejoj per la markolo Magellan, konsistis el aro de malfekundaj vulkanoriĉaj insuloj, kio donigis al ĝi la nomon Fajrolando. La loĝantoj estis tre malmulte evoluintaj.

Tuj, detalo mirigis la konkerantojn : ĉeesto de la kruco ĉe la ornamaĵaro de temploj, sur teksaĵoj, kaj sur juveloj. La sciencaj esploroj, la elfosadoj, foje la hazardo, kaŭzis fantastajn eltrovojn, kiuj plifortigis la misteron pri la origino de la loĝantoj de la « Nova-Mondo ». La svastiko aŭ hokokruco, kiun oni kredis origina de Hindio, troviĝas ĉie, kun aliaj formoj de la kruco. La spiralo, la serpento, kreditaj el la megalita civilizo aŭ el Afrikaj kaj Aziaj triboj estis konstante uzitaj. En Meksikio oni eltrovis rimarkindan civilizon — ja tre diferenca de la Eŭropa, — kies arkitekturaj kaj artaj atingoj egalis, eĉ superis kelkajn el niaj plej belaj sukcesaĵoj. La ĉefurbo de la lando, Tenoĉitlan — nun Meksiko — konstruita sur lago Tezkuko, ornamita de mirindaj temploj kaj palacoj, montris urbanisman sciencon apenaŭ konjektitan de la Eŭropanoj.

La esploroj rivelis la ekziston de la diversepokaj, evoluintaj civilizoj jam de longe malaperintaj. Kaj la tempo de eltrovoj jam ne estas finita ! Gravaj urboj, imponaj konstruaĵoj, majestaj kaj riĉe ornamitaj temploj kaj palacoj estis trovitaj en montaraj masivoj kaj meze de la Amazona praarbaro. Gravaj vojretoj, kies kelkaj partoj estas ankoraŭ vetureblaj, kunligis ekstreme distancaj punktoj, kie gravaj restaĵoj montras, ke tie ekzistis potencaj urbaj centroj. Multaj kaj strangaj monumentoj mirigas la imagon :

piramidoj similaj al la Egiptaj aù al la haldeaj ziguratoj. Unu havas dimensiojn kompareblajn je tiuj de la piramido de Ĥeops (la Granda piramido de Gizeh). Tiuj prahistoriaj popoloj kredataj sovaĝuloj estis arkitektoj, pentristoj, skulptistoj, ceramikistoj, juvelistoj, kaj konis skribon. Oni trovis multajn inskripciojn en la temploj ; ankaù milojn da pentritaj manuskriptoj en temploj kaj en konstruaĵoj, kiuj estis kredeble arkivejoj aù bibliotekoj.

Malfeliĉe, tiu nekredebla amaso de dokumentoj — kiuj, sendube, estus ebligantaj scii la historion de tiuj malaperintaj popoloj, kaj tre kredeble estus donintaj kelkajn sciencajn konojn — estis preskaù tute detruita de la Hispanaj episkopoj kaj misiistoj. Kompreneble, la konkero kaùzis rabon de la valoraj objektoj kaj ruinigon de la temploj kaj de ties arkivoj. Sed plie, ĉiuj skribaĵoj estis konsideataj kiel « verkoj de la diablo », kaj ordone de la « Sankta Inkvizicio », devis esti elbruligitaj. Tiel, la unua episkopo de Meksiko, don (Sinjoro) Juan de Zumarza, bruligis sur la granda placo de la vendejo Tatleloko, ĉiujn arkivojn de Tenoĉitlan kaj multegajn manuskriptojn. Laù ĉeestinto, ili estis en amaso « tiel dika kiel monto ». En 1550, monaĥo Diego de Landa bruligis en Mani milojn da manuskriptoj trovitaj en Jukatano.

La malmultaj libroj eskapintaj de la detruo estas konservataj en muzeoj aù grandaj bibliotekoj de Ameriko kaj Eùropo. Malgraù la detruoj, la inskripcioj kaj diversaj arkeologiaj dokumentoj ebligis retrovi iujn punktojn el la historio de tiuj Amerikaj popoloj. Sed ĉiam daùras la mistero pri iliaj originoj, kaj pri la kaùzoj de la subita malapero de la gentoj aù nacioj antaùintaj la Aztekojn de Meksikio, la Inkaojn de Bolivio kaj Peruo, la Majaojn de Jukatano. Same, ni ne konas la devenon de tiuj pli-malpli evoluintaj triboj el kiuj multaj estingiĝis depost la alveno de la Eùropanoj. Oni nomas « prakolombaj » tiujn gentojn kaj popolojn antaùajn je la alveno de Kolombo.

La plej antikva atesto pri la prakolombaj civilizoj estis trovita en la Peruaj Andoj. La vastega altebenaĵo Markahùasi estas surŝutita de strangaj skulptitaj rokoj, kiuj rivelas sian veran figuron nur je iuj horoj de la tago, kiam la sunradioj atingas ilin laù determinita angulo. La skulptaĵoj ĝenerale montras bestojn jam malaperintajn dum la prahistoriaj tempoj, ekzemple elefanton, aù aliajn. Oni ne povis kalkuli ilian aĝon. Jen ankoraù pli stranga afero. Similaj skulptitaj rokoj ekzistas en aliaj partoj de la mondo. La fama « Kaoso » de la arbaro de Fontainebleau en Francio estas unu rimarkinda specimeno. Evidente, tiuj rokaroj estis kultejoj, eble magiaj lokoj, probable antaùa je la megalita civilizo. Estas ankaù multaj inskripcioj, sed ili jam ne estas deĉifritaj.

Sur la bordoj de lago Titikako, estis eltrovitaj la restaĵoj de prahistoria urbego nomita Tjahùanako. Ĝi estas konstruita el rokpecoj pezantaj plurajn tunojn, mirinde alĝustigitaj. La « Pordo de l'Suno », giganta monolito, kies unu skulptaĵo estas agnoskita kiel precizega kalendaro, kaj alia tre similas modernan kosmonaùton.

Estis deduktite el la giganteco de tiuj konstruaĵoj, el la skulptaĵoj, kaj el diversaj tradicioj, ke la konstruintoj estis gigantoj venintaj el alia planedo. Tio estas alloga hipotezo, sed tre malfirma. Tradicioj pri gigantoj loĝintaj sur la tero estas universalaj. Ni scias, ke la loĝantoj de Mù kreskis ĝis 1,80 metro eĉ ĝis 2 metroj. Nuntempe, tiastaturaj homoj ne estas tre raraj. Skandinavo estas giganto kompare je Vasko. Post du mil jaroj, se oni trovos en la tero restaĵojn de la urbdomo de Turso (Tours) en Francio, konstruita antaù nur 80 jaroj, la grandajn dimensiojn de la vestiblo, la kolonoj, la statuoj, la kariatidoj de la balkono kredigos ke la homoj de nia epoko mezuris 2,50 metrojn ĝis 3 metrojn. La ŝtonoj kaj la tekniko uzitaj por la konstruo de Tjahùanako estas kompareblaj je tiuj de la piramidoj de Gizeh ; tamen, la Egiptoj ne estis gigantoj. La kosmonaùto mem, ĉu li ne estis terano ? Sen nei la probablecon de vizitoj de transteruloj, kion ni scias pri la Lemurianoj kaj Atlantisanoj ebligas tiun hipotezon. La statuo ja estas giganta, sed ne pruvas pli ol la statuoj de la urbdomo aù pli ol tiu de la aviadisto Lemaitre en la tombejo de Turso, kiu superas du metrojn ; ĝi tamen estas bildo de unu el niaj samtempuloj. ĉu niaj ĵurnaloj ne parolas kun grandaj titoloj pri la « Gigantoj de la Vojo » ? Nu, la ciklistoj de la ĉirkaùciklado ĉirkaù Francio havas tute normalan staturon.

Eĉ la legendo pri la bela palmita Venusanino Oreĵona tute ne estas konvinkiga. ĉu ni ne havas en Francio la legendon pri reĝino Pedaùko, kies nomo signifas « Ansera Piedo », kaj kies figuron oni trovis sur romanikaj preĝejoj en la Okcitana regiono, en Sud-okcidenta Francio ?

La plej antikva de ni konata civilizo estas la imperio de la Inkaoj. Ĝi etendiĝis sur la tuta Peruo, la respubliko Ekvatoro, partoj de Bolivio kaj Ĉilio. En 1911, ekspedicio trovis je altitudo ĉirkaù tri-mil-metra en Kordilero, giganta urbo nomita Maĉu-Piĉu laù la nomo de la monto sur kiu, ĝi estis parte konstruita. La ĉirkaùanta kamparo estis fekundigita de inĝenia reto de irigaciaj kanaloj. Oni opinias, ke ĝi datumas 4000 jarojn antaù nia erao. Je kiu dato, kaj kiel okazis la malapero de tiu potenca popolo ? Enigmoj. Ŝajne la ĉefurbo de la Inkaoj estis Kuzko, kies imponaj ruinaĵoj staras en la centro de Peruo. Tiu civilizo konis skribon, kaj elvolvis realan sciencan kaj artan kulturon. Ni ankoraù scias nur malmulton pri ĝi.

Esploroj ebligis scii, ke ĉirkaù la 4a aù 5a jarcento post Kristo, du popoloj instaliĝis en regionoj proksimaj de la istmo de Panamo, la Miztekoj kaj la Zapotekoj. Ili elvolvis verajn civilizojn, sed malaperis post du aù tri jarcentoj.

En Jukatano, Meksikio, Honduraso, kaj Salvadoro ekzistas ankoraù idoj de la Majaoj, tre alte civilizita popolo, kiu ŝajne, aperis en Jukatano ĉirkaù la 8a aù 9a jarcento post Kristo. Iliaj numtempaj idoj, disigitaj, konservis el siaj prapatroj nur dialektojn el la gepatra lingvo. Kiel kaj kiam tiu civilizo displiĝis ? Ni ne scias. Eble, sekve de invado dum la 12a kaj 13a jarcentoj de la Toltekoj kaj poste de la Ĉiĉimekoj ? Tiuj estis siavice konkeritaj dum la 14a jarcento de la Aztekoj, kies vasta kaj potenca imperio estis definitive detruita en 1525, de Cortes (pr. : kortes) la fama Hispana kapitano. De kie venis tiuj diversaj popoloj, kiuj per kvazaù sinsekvaj ondoj invadis Meksikion ? Ĝis nun estas neeble scii tion.

(Daùrigota)

Eloi MOTHLON.

PRELEGOJ DE GRESILLON

" HOMO KAJ MAŜINO "

LA LABORO DE LA TRANĈIL-METIISTO TRA LA TEMPOJ

La ŝtonepoko.

Samaĝaj estas tranĉilo kaj homo. Tranĉilo estas unu el la unuaj iloj necesaj por la sekureco kaj la vivo de la individuo.

Tiuj unuaj tranĉaj iloj estis ĉefe splitoj da siliko, tajlitaj aŭ poluritaj. Oni retrovis, tra multaj landoj, multnombrajn prilaboritajn silikojn.

Tre belajn ekzemplerojn oni malkovris en « Le Grand Pressigny » je cento da kilometroj sude de Grezijono. La tiuregionaj prahomoj kreis tie veran tranĉilfabrikejon ; ili finpretigis la produkton per polurado kontraŭ specoj de ŝtonoj speciale malmolaj.

Tiu praa maniero labori uzis nur homan forton por prilabori ŝtonon per premo, per frapo kaj por ĝin poluri, per frotado kontraŭ senmova « muelilo ». La « polurilo » de Baugé estas, pri tio, bona ekzemplo.

Tiuj metodoj, tre penigaj, estis malmulte efikaj ; tamen, per multe da tempo kaj da penoj, homoj produktis la neprajn ilojn de la ĉiu-taga vivo.

Tiu tekniko, perfekte preparita, dum miloj da jaroj ebligis eliton de tre lertaj manfabrikistoj provizi al la naskiĝanta homaro, ilaron tiel ŝatatan ke homoj ilin aprezis ĝis la adoro. Ekzemple, la kulto de la elŝtona hakilo praktikita dum tre longa tempo kaj tiel forte, ke, eĉ dum la ferepoko, oni ankoraŭ adoris tiun unuan ilon, kaj oni povas opinii ke, la laboristo scipovanta ĝin produkti, ĝuis grandan estimon.

La Meksikianoj fabrikis, longtempe antaŭ la malkovro de l'nova mondo, tranĉilojn el obsidiano, speco de elvulkana ŝtono. La unuaj konkeristoj miris pro la impona interŝanĝo de tiu kruda materio, kiu okazis inter la triboj.

Kvankam la praaj homoj, kiuj fabrikis tiujn objektojn eble estis malsuperaj al ni rilate civilizacion, tamen la iloj kaj la klingoj el ŝtono (produktitaj de la skandinavoj, ekzemple) montras perfektan teknikon, uzitan de manfabrikantaro tre lerta.

Krom eble en Egiptio, nenie la arto de la splitigado kaj de la « finpretigado » atingis tiel altan nivelon de perfekteco kiel en Danlando, en la fino de la ŝtonepoko.

Tie metiistoj rimarkinde lertaj, produktis klingojn tre beldelikate verkitajn.

Ekzistis vigla interŝanĝo pri tiuj ŝtonoj fabrikitaj de specialistoj, per tute metiistaj peroj, inter la tiamaj produktlokoj de tranĉiloj.

La siliko-tranĉilo por ceremonio muntita kun oro, kaj la tranĉilo el feldzpato, el Sud-Ameriko estas verkoj, rimarkindaj laŭ arto, lerte prilaboritaj de metiistoj.

La lerteco en la fabrikado de la iloj el ŝtono aŭ el mineraloj ne estis propra al iuj regionoj ; la praaj loĝantoj de Okcident-Afriko, ekzemple, produktis ilojn samnivelajn kiel la silikoj de Okcidenta Eŭropo.

Per tiaj iloj, laŭ niaj okuloj mokinde simplaj, niaj prapatroj ekkreis la « komfortecon » kiun, ni nun profitas.

La kulero.

Preskaŭ samaĝaj estas la kulero kaj la tranĉilo, oni trovas ĝin, el korno de boaco, en multaj elfosaĵoj.

Tiu ilo estis unu el la unuaj, kiujn la homo bezonis. Verŝajne, ĝi estis uzata tuj post la fabrikado de la unuaj poterioj. Tiuj fabrikoj estis etapo en la evoluo de la homo. Jam li scipovis kuiri.

La metal-epoko — La bronzo.

La arto preciziĝis per la uzo de l'metalaj minaĵoj de kupro kaj de stano, allogaj pro siaj koloroj.

Per kuna fandado, oni akiras bronzon. 70 gradoj sufiĉas por fandi tiujn minaĵojn ; tio estis rilative facile akirebla eĉ per praaj peroj.

Unue, la tranĉilo el bronzo fandita kaj frapadita por malmoligi la tranĉparton kaj poste la tuta tranĉilaro estis fabrikitaj.

En Okcidenta-Eŭropo, ofte oni trovis razilojn el bronzo en la porcindraj urnoj de la Bronzepoko.

Tio pruvas, ke, jam homo pensis pri koketeco.

La ferepoko.

La vera revolucio en la fabriko de l'tranĉilo estas la uzo de l'fero, metalo pli malfacile produktebla ĉar necesas varmigi ĝis 1400 gradoj por ĝin fandi, kaj poste necesas ĝin forĝi.

Ĝia prilaboro postulas teknikon kaj materialojn, kiujn la homoj ne havis ĝis tiam.

La tranĉilo-fabrikisto, ĉiam ĉe la pinto de l'progreso, pli kaj pli uzis tiun materialon. Ĉio, kio temis pri metalurgio estis sakra kaj la forĝisto ĝuis estimon samnivelan ol tiu de la ĉefoj kaj de la pastroj.

La sanktaj libroj de Hindio datas la malkovron de l'fero en « 2975 » antaŭ Kristo, ĝi estis kunportita de la « Curètes » en Grekujon laŭdire, dank'al la brulado de « Monto Yda », kies brulego fandis la ferminaĵon ĉe la grundo. Oni situas tiun brulegon en 1432 antaŭ J. Kristo. Homère en sia verko skribis pri la fero... kaj eĉ diris : « Ephaïstos, kiu ruĝigis la feron en la forĝejo kaj metis ĝin en akvon por ĝin malmoligi ».

Tiuj vortoj klarvideble diras ke je la tempo de Homère, la Grekoj havis ideon pri la hardado de l'fero.

Herodoto priskribis la tranĉilojn uzatajn en Grekujo kaj insistas pri la kvalito de tiuj faritaj en Chalcis en Eubée.

La Romanoj uzis, por la kuirejo, tranĉilojn kun klingo el fero, kaj nomis ilin : « culter ».

La Galoj uzis por la ĉaso, tranĉilon, kiun ili forĵetis per rimeno.

La Frankoj kunportis ĉe la zono, bataltranĉilon, tiel nomita « scramasaxe ».

La Lombardoj estis la plej bonaj tranĉilfaristoj en sia epoko ; la elfosado de Testona, Italio, ĝin pruvas.

La Burgondoj estis bonegaj forĝistoj ; ili fabrikis tondilojn kun risorto nomitajn « forces », la prapatrojn de la nunaj tondiloj.

Ek de tiu momento, pri la manpolurado la ir kaj revenlinia movado laŭlonge de senmovaj mueliloj estis anstataŭigita per senĉesa movado de cirklaj mueliloj kun akso, movigitaj per homa aŭ besta forto, kaj poste per aliaj energiaj formoj, ĉefe la akva forto.

Tiam la fabrikisto bezonis nur apogi la klingojn kontraŭ la muelilo. Jen, nekalkulebla progreso, kiu ebligis samtempe altigante la precizon de la laborado, obligi la produkton, malaltigante la penon de la laboristo.

La Aŭvernianoj, la unuaj en Francio uzis la vivantajn akvojn falantajn de siaj montoj, ne nur por muelejoj

kaj segejoj sed ankaŭ, en Ambert por la paperfabrikejoj, kaj en Thiers, por la trançil-fabrikejoj.

La trançil-fabrikisto samtempe imagis novajn pli efikajn ilojn.

Ek de tiu momento, la tekniko estis preta kaj donis al la homaro ĉiajn elementojn necesajn por ĝia estonta prospero.

La ŝtalepoko en Eŭropo.

La diversaj invadoj de la tielnomitaj « Barbaroj » ne estis, precize, favoraj ĝenerale al la disvolviĝo de la tekniko, kaj, precipe al la arta serĉado.

Ĝis la 11a jarcento, armiloj kaj trançiloj el la tiama Francio estis faritaj el fero, pli malpli frapita per martelo laŭ la ŝtalaj farmetodoj de la Hindioj, Egiptanoj kaj Grekoj perdiĝis dum tiaj militaj kaj malkleraj tempoj.

La Araboj estis la gardantoj de la sekreto. Post la reveniro de la unua krucmilito, anoncita en Clermont (Aŭvernio) de la Papo Urbano la IIa, en 1095, kaj kiu okazis por la kristanoj kun elferaj armiloj kaj al kiu partoprenis popolanoj kaj manlaboristoj, post la reveniro de la krucmilito do, oni raportis el Oriento la arton ŝtaligi la feron.

Eblas ke la sekreto de la hardado venis el Hispanio ; sed la deveno estas ĉiokaze Araba.

La tondiloj.

Pri la tondiloj, oni ne scias ĝuste dum kiu epoko ili estis malkovrataj. Oni renkontas ilin, unuafoje, sur sigelo de la tajlora grupo de Bruĝo.

La posedaĵa-listo de Clemence de Hungario en 1328a, indikas 2 parojn da tondiloj.

Ni rajtas situi la malkovron de la tondiloj kun « brançoj » dum la XIIIa.

THIERS

La unua historia pruvo, pri la trançilfarado en Thiers, konsistas el la urbaj privilegioj en 1272a, de la « Costelliers », kiuj, tiam sciipovis hardi la feron.

Skribaĵo de 1474 indikas, el la tiama nombrita popolaro de Thiers, kvaronon da trançilfaradistoj.

De la 14a jarcento, Thiers eksterlanden sendas sian trançilprodukton ; al Nederlando, Hispanio, Lombardio, kaj poste ĉefe al Hispanio, Portugalio.

La pilgrimantoj irante de Nordo al Sankta Jako de Compostelle trairante Thiers, estis ĝiaj agentoj por ekster-landa sendo. Por pagi la vojaĝ-prezon, ili aĉetis trançilojn en Thiers kaj vendis ilin ĝis Hispanio ; revenante ili denove aĉetis kaj vendis ilin ĝis Nederlando. La ŝipoj de Isabelle de Castille kaj de Ferdinand d'Aragon (gereĝoj de Hispanio) kunportis Thiers-ajn trançilojn ek de siaj unuaj vojaĝoj al Ameriko ; Ili estis tie, tiel ŝatataj ke en Thiers la nombro de trançilfabrikistoj duobliĝis en 50 jaroj.

La tiamaj sindikatoj verkis postulemajn leĝojn por garantii la kvaliton de la fabriko de la Thiers-a trançilaro.

La metiistoj el Thiers daŭrigis sian famon tial, de tiu tempo, Ameriko senĉese estis tre grava kliento por la Thiersaj produktaĵoj.

Dank'al la akva forto de la « Durolle », rivero de Thiers, la lerteco de la laboristoj, la vigleco de la komercistoj la urbo estis iĝinta, tiam, unu el la plej gravaj industriaj urboj el Francio, dum la 16-17a jarcento.

Forĝadon kaj akrigadon de la klingoj oni faris dankal la potenco de la akvo, la nura forto kiun oni tiam konis kaj miloj da manlaboristoj plenumis la tiom-diversajn operaciojn kiujn bezonas la fabrikado de trançiloj, tondiloj, raziloj kaj aliaj akraj objektoj. Ili laboris laŭlonge de la rivero en uzinoj dank'al la potenco de la akvo aŭ en la stratoj de la urbo mem en etaj butikoj.

La metiistoj familie laboris klopodante gajni sian vivon sed portante tra la tuta mondo la famon de la produkto de la urbo, kiu iĝis la franca ĉefurbo de la trançilfarado.

La forko.

Ĝis la fino de la 16a, la forko ne ekzistis, oni trançis per trançilo kaj, por preni la manĝaĵojn, oni uzis la fingrojn kaj la pinto de la trançilo. Tiacele ĝi havis pintan finon. Dum la 17a, la moderna forko disvolviĝis kaj la tablotrançiloj iĝis rondaj je la pinto.

La fermebla trançilo.

Dum la 17a, la trançilistoj ekfabrikis fermeblajn trançilojn. La faciluzo de tiuj ĉi ege altigis la produkton, laj rapide, kreskis multajn modelojn laŭ la fantazio de la trançilistoj kaj la peto de la uzantoj.

En luksa fabrikado, la trançiistoj de la 18a uzis grandan riĉecon tiel pri la materialoj kiel pri la fabrikadoj. La Trançil-mastroj fieregis plibonigante maloftajn produktaĵojn, kiuj montris ilian profesian lertecon.

Estis Majstraj-verkoj, vere artaj objektoj. La teniloj el eburo estis plibeligitaj per inkrustaĵo de oro kaj argento. La nekredeblaj prezoj pagitaj de la nuntempaj aĉetemuloj por la tiamaj trançilaĵoj, pruvas kiom alte ili estas ŝatataj.

Iom post iom, la farmetodoj pliboniĝis kaj iaj operacioj plirapidiĝis kaj postulis malpli da peno. Sed aliaj operacioj, ekzemple la muntado, evoluis tre malrapide.

Oni pli bone uzis la riverojn, la akvoturbinoj kun vertikala aŭ horizontala akso komencis anstataŭi la perakvo-moveblan radon.

Ankaŭ, la socia progreso ebligis la laboristojn labori en pli bonaj ĉirkaŭaĵoj. La samaj krudaj materialoj, ekzemple eburo, korno, ligno, perlamoto estis senĉese uzitaj kaj nur je la fino de la 19a aperis la unuaj artefaritaj materioj, kiuj ebligis malaltigi la prezojn kaj produkti grandskale.

Sed la kvalitoj kiuj estis rigardataj ĝis nun kiel tute nepraj, samtempe de la laboristoj kaj de la estroj iĝis por kelkaj ne tiel gravaj, en la trorapideca kaj grandskala produkto de nia epoko.

La metiistoj, ĝenerale, fabrikante malgrandajn kvantojn ĉiam konservis la renomon de kvalito akiritan de iliaj prapatroj.

La neoksidebla ŝtalo.

Kelkajn jarojn antaŭ la milito 1914-1918, la neoksidebla ŝtalo sanĝis la fabrikadon de la trançilaro kaj la Thiersanoj la unuaj uzis la noblan ŝtalon. Oni devis ŝanĝi la farmetodojn kaj adaptigi la ilojn al la nova metalo.

En Thiers, la trançilfaradistoj pli kaj pli disvastiĝantaj fabrikis 70 ĝis 80 % de la Franca produkto kaj la modeloj fabrikitaj ĉirkaŭas du dek mil.

Pli grandaj firmoj ankaŭ bonstatis.

Sed nun, ĉio rapide evoluas, ĉiuj specialiĝas aŭ serĉas aliajn fabrikadojn.

De la korno uzata por la teniloj, oni iras al la plasto. La uzinoj forlasas la valon de la rivero por iri sur la proksiman ebenaĵon kaj la malgrandaj laborejoj iom post iom malaperas. Tamen, oni nombras ankoraŭ du cent kvin dek metiistojn kiuj plej ofte laboras familie por fabriki la altvalorajn trançilojn.

Kiel ekzemple specialaj ponardoj el nemagneta ŝtalo ĉiocele uzitaj de la militistaj submaraj naĝistoj. Oni trovis nur en Thiers laboristojn scipovantajn fabriki tian ponardon.

(Daŭrigota).

KRISTOS PATRO KAJ FILO.

HAR - FOIROJ

Post longa eklipso denove perukoj renkontas grandan favoron. En la komenco nur riĉaj elegantulinoj povis aĉeti tiun kostan allogan akcesoraĵon. La « eŭropaj » haroj permesis fari perukojn « laŭmezure ». Sed ili estis tre kostaj. Jam la indoneziaj haroj donis perukojn malpli kostajn. Baldaŭ la industriistoj proponis sintezajn harojn ; ili estas malpezaj, rapide lavitaj, rapide sekigitaj, rapide kombitaj ; ili estas malpli kostaj ; ili permesas al ĉiuj virinoj harmoniigi siajn harojn al sia robo, aŭ al sia humoro, ŝanĝi sian kapon okaze de vesper-kunveno, aŭ proponi — sen danĝero — novan virinon al sia edzo !

Eĉ la viroj, tiom koketaj, kiom la virinoj, portas perukojn por kaŝi naskiĝantan kalvecon, por havi longajn harojn laŭ la nuna modo. Eĉ oni vidas en montrofenestroj « Perukoj por forpermesuloj » ; la soldatoj de la kontingento povas prezentiĝi antaŭ sia fianĉino, aŭ alia, kun bela flatema hararo !

Sed tiu modo ekzitis antaŭ nia estanteco : Jen artikolo eltirita el ĵurnalo de 1899.

« Ĉiun someron oni falĉas tritikojn, ĉiun aŭtunon oni rikoltas vinberojn. Alia rikolto malpli konata, ne malpli pitoreska okazas ĉiun jaron je regulaj periodoj. Tiu de la haroj. Tiu rikolto havas, kiel la aliaj, siajn laboristojn, siajn vendistojn, siajn aĉetantojn ; dank'al siaj foiroj ĝi provizas specialan industrion, specialan komercon : komerco kaj industrio de la postiĉoj.

Tiu industrio ĉiutempe ekzistis. La egiptinoj de Thebes (Tebo) portis, antaŭ 4 000 jaroj, perukojn tute similajn al tiuj, kiujn oni trovis en la templo de Izisa. La edzinoj de la ĝermanoj vendis siajn harojn al la elegantaj romaninoj. En Francujo, en la 17-a jarcento, la perukoj furoris.

Hodiaŭ (1899) en kelkaj francaj provincoj (Bretonio, Limoĝio, Aŭvernio, Pireneoj, Vendeo) la har-rikolto okazas de majo al julio kaj de septembro al novembro, dum la varmaj monatoj kaj okaze de « Asembleoj » (vesperaj kunvenoj) kaj de la « Pardonoj ». Sur la placo de la foiro, en la kribruado de la popolamaso, meze de multegaj budoj, viro vestita je longa kitelo, instalis sian budon ; ĉe fosto pendas diverskoloraj hararoj. Estas la « tranĉisto », kiun lia dunganto, la makleristo, sendis en vilaĝojn kun varoj kaj mono.

Antaŭ si li etendis indienojn, muslinojn, kalikotojn, kotonaĵojn, naztukojn, kufojn, fulardojn. La kamparaninoj, dimanĉe vestitaj, ĉirkaŭas tiujn mirindaĵojn. Ili palpas la ŝtofojn, unu la alian sin puŝas per la kubuto, denove palpas, remetas la ŝtofojn sur la tablon kaj aŭskultas la babiladon de la « tranĉisto ».

— « Virinoj ! vendu viajn harojn ! vendu viajn harojn ! Mi prenas ilin tiajn, kiaj ili estas : mallongaj aŭ longaj, nigraj aŭ blondaj, cindraj aŭ kaŝtankoloraj ! »

Kaj lia dika mano movas la ŝtofojn, prenas kufon, kiun li metas sur sian kapon, malvolvas



sub la suno fulardon kun floroj, kaj ĝin skuas. Dume liaj ruzaj okuloj sekvas sur la virinaj vizaĝoj la rezulton de siaj paroloj kaj gestoj.

« Vendu viajn harojn ! vendu viajn harojn ! » Baldaŭ unu el la virnoj decidiĝas : ŝi deziras kufon aŭ naztukon ; ŝi formetas sian blankan kufon ; ŝiaj haroj, ĝis nun ligitaj kaj kaŝitaj, aperas ; la pingloj falas, la haroj disvolviĝas ; la virino sidiĝis sur la seĝon ; la tranĉisto grave operacias. Ĉio iras bone ! la aliaj virinoj ankaŭ sidiĝos antaŭ la tranciston ! Kelkfoje nura naztuko sufiĉos por decidigi la hezitemulinojn. Tamen povas okazi, ke la virinoj, precipe en Normandio, estas pli postulemaj. Ili volas bonajn pecojn da ŝtofoj aŭ belajn eskudojn !

Post unu foiro, jen alia foiro, kaj la haroj pli kaj pli anstataŭas la ŝtofojn en la paksako de la tranĉisto. Kiam la rikolto atingas 25-30 kilogramojn, li reiras al la vilaĝo, kie la makleristo atendas lin. Li vendas al li la harojn kontraŭ mono aŭ aliaj varoj ; kaj li reiras al foiroj. La makleristo, siavice, direktiĝas al Limoĝo okaze de la somera Sankta Johano. Tie ĉi li renkontas

aliajn makleristojn ; iliaj kofroj kaj sakoj entenas harojn de kelkaj centoj da kapoj ; ili loĝas en samaj hoteloj ; ĉiuj venis ĉi tien por renkonti parizajn aŭ eksterlandajn aĉetantojn ; tiuj ĉi aĉetas pogrande la harojn.

Oni ne ripozas ; oni ne perdas tempon, la makleristoj, kiel eble plej rapide, kuras por sieĝi la Aĉetanton. Unuj lin atendas en antaŭĉambro ; aliaj lin gvatas en la koridoroj ; aliaj, pli ŝancemaj, perfortis lian pordon kaj jam disvolvas antaŭ li la plej belajn hararojn, valorigante per senĉesa parolemo ilian longon, ilian fajnecon, ilian brilon. Sed la Aĉetanto malfidas : li ekzamenas kaj mane pezas, palpas ; longa eksperimento sciigis al li, ke verniso briligas la harojn, ke graso aŭ vakso ilin plipezigas. Li proponas prezon : 50 F. kilograme ; kelkfoje 80 F. Se la makleristoj ne akceptas li reiras Parizon, nenion aĉetinte. Li scias, ke la makleristoj venos en Parizon. La kunveno en Limoĝio servas nur por starigi la kurzon. En aŭgusto kaj en oktobro la makleristoj iros al Parizo kaj vendos sian stokon. Tiuj haroj servos al kreado de postiĉoj. Aliaj haroj ankaŭ servas : estas tiuj, kiuj restis ĉe la dentoj de la kombilo aŭ sur la brosoj ; ĝenerale oni ilin forĵetas, nesciante la valoron de tiuj elkombitaĵoj ; estas la ĉifonisto, kiu ilin kolektas sur la stratoj ; li ilin purigas kaj ilin vendas al la pogrand-aĉetanto. Tamen belaj plektaĵoj el naturaj haroj pezantaj de 80 ĝis 100 gr. povas kosti ĝis 6 000 F. Tion oni pagis en Nov-Jorko, en 1865, por blonda plektaĵo el pariza fabrikado. La plektaĵoj el haroj blankaj precipe kiam ili estas ondumitaj ankoraŭ pli kostas, precipe kiam la haroj estas perfekte blankaj, kiam la pintoj estas samkoloraj kiel la radikoj, kaj kiam ili mezuras almenaŭ 70 cm. Tiajn harojn oni havas nur elektante meze de cento da plektaĵoj. Tiam unu kilogramo de tiuj haroj valoras 10 000 F. Certe multaj virinoj ne scias, ke ili havas veran fortunon sur sia kapo. Tamen kelkaj tion scias kaj ĝin profitas.

S-ro Raoul, postiĉulo en Opera-Avenuo, longtempe ricevis, fine de ĉiu jaro, viziton de sinjorino, kiu posedis admirindan blankan hararon ondumitan ; ŝi tute simple eniris kaj diris : « Hodiaŭ mi devas pagi mian kudristinon » ; ŝi donis pakaĵon en kiu ŝi estis kolektinta, laŭ diverslongaj fasketoj, la harojn, kiujn ŝi elprenis ĉiutage el sia kombilo. Kaj la sinjorino foriris kun monbiletoj.

Ĉar la haroj tiom valoras, troviĝas har-ŝtelistoj ; ili estas rimarkinde lertaj. Jen kio antaŭ du jaroj, okazis al knabineto. Kun sia patrino, Sinjorino R., ŝi eniris en preĝejon ; ili sidiĝis en flanka kapelo ; preskaŭ tuj, du virinoj, nigre vestitaj, sidiĝis malantaŭ ili. Post dek minutoj S-ino R. kaj la knabino foriris el la preĝejo ; la du virinoj estis jam for. Post momento S-ino R. subite konstatis, ke ŝia filino ne plu havis sian belegan harplektaĵon, kiu antaŭe pendis sur sia dorso. La knabineto memoris nur pri leĝera tiklo sur sia nuko ! Tiaj aventuroj estas raraj.

Tamen pli ofte oni aŭdis pri sakristiano, precipe en Bretonio, kiu komercis per hararoj. Multaj bretonaj sanktuloj havas la reputacion kuraci migrenojn. Por montri sin dankemaj la virinoj oferas sian hararon al la sanktulo. Ili pie trancas siajn harojn kaj pie metas ilin sur la altaron ; ili restas tie ĉi kelkajn tagojn. Poste la sakristiano ilin metas en tirkeston, ĝis pasado de la trancisto, kiu ilin aĉetos. Nur Dio scias, kio okazas pri tiuj voto-oferoj !

Por iĝi postiĉoj, plektaĵoj, frizaĵoj aŭ krispigaĵoj, la haroj devas suferi multajn operaciojn.

Unue oni ilin arigas laŭ sama koloro, sama longo ; la plej kurtaj servos por krispigaĵoj. Poste oni purigas la harojn ; oni ilin elpedikovigas ; post lavado oni pendigas ilin por ke la tuta akvo forfluu, kaj oni ilin volvas ĉirkaŭ lignaj aŭ vitraj cilindroj ; oni envolvas en papero, oni ŝnuretas kaj oni lasas la tuton dum 2-3 tagoj en etuvo ; tiam la frizo estas bela.

La postiĉisto estas artisto ; nur li prenas mezurojn, nur li laboras laŭ la vizaĝo de la klientino. Kudriloj, kanvasoj, kapoj el kartono aŭ ligno jen liaj iloj kaj tiuj de la enplantistinoj ; ĉar ilia metio estas delikata kaj postulas longan metilernadon tiuj ĉi gajnas ĝis 7,50 F. ĉiutage.

La perukojn oni faras nur laŭmezure. Ne estas same por la harbendoj, kiujn oni eksportas precipe en Pollandon por la judaj polinoj ; ili portas harbendojn por kaŝi siajn naturajn harojn, kiujn nur la edzoj rajtas vidi. Unu el niaj industriistoj eksportas monate de 400 ĝis 500 kilogramojn da harbendoj. La plej multo el tiuj harbendoj estas ellaboritaj en Parizo per ĉinaj nigraj haroj. Ja nu ne pensu, ke ni uzas nur indiĝenajn harojn ! Italujo sendas al ni nigrajn harojn ; sed oni devas ilin tinkturi ĉar ili havas ruĝajn rebrilojn. Laŭ freŝdata statistiko 8 000 kilogramoj da haroj estas ĉiujare senditaj al ni el Belgujo kaj 3 000 el Bohemujo. La cindroblondaj venas precipe el Svedujo ; sed ilia alta kosto haltigis la importadon. Ĉinio estas nia plej grava provizisto. Marsejlo ricevas el ĝi, favorjare aŭ malfavorjare 100 000 kg. da ĉinaj haroj ; ili estas pli dikaj ol la eŭropaj kaj oni devas ilin maldikigi, kio igas ilin rompiĝemaj ; certe oni ne povas ilin distingi de la italaj aŭ de la savojaj. Oni ilin tinkturas : el tiuj longaj kaj tenebraj plektaĵoj, dank'al oksigeno kaj trempado, jen baldaŭ bela peruko « Veronezo-blonda ».

Por tiaj operacioj oni havas en Parizo specialajn uzinojn inter kiuj unu el ili traktas nur ĉinajn harojn ; ĉiu uzino havas specialajn procedojn, proprajn receptojn, kies sekretoj estas ĵaluze garditaj ».

DENTO - DOLORO

SKEĈO DE BUKAR

Dekoracio

Atendejo de dentisto : seĝoj, tableto, vesto-hokaro, ktp.

Du pordoj : la fona al la ekstero, la flanka (dekstra aŭ maldekstra) al la resto de la apartamento, i. a. al la kuraco-ĉambro de la dentisto.

Roluloj

SUZANA : servistino de dentisto ;
naiva sed bonkora bonintenca.

KLIENTO : kliento de dentisto ;
mezaĝa.

(Kiam la kurteno leviĝas, la sceneio estas malplena ; iu sonoras ĉe la fona pordo ; SUZANA haste eniras tra la flanka pordo, kuretas al la fona pordo, ĝin malfermas ; eniras KLIENTO, kiu tenas unu manon kontraŭ la vango, kaj videble tre suferas pro dento-doloro ; en la alia mano li tenas ĉapelon.)

SUZANA. — Bonan tagon, Sinjoro ; ĉu vi venas por vidi la dentiston ?

KLIENTO (malagrable). — Kompreneble mi venas por vidi la dentiston ! Por kio ajn alia mi venus tien ĉi ? Mi terure suferas, kaj...

SUZANA. — Jes, mi vidas tion. Ho ! Sinjoro, mi kompatas vin !

KLIENTO (sarkasme). — Dankon ! Sed ne nur kompaton mi serĉas ; ĉu la dentisto povos kuraci min tuj ?

SUZANA. — Tion mi iros demandi, Sinjoro ; bonvolu doni al mi vian ĉapelon, kaj sidiĝi.

(SUZANA prenas lian ĉapelon kaj pendigas ĝin ĉe la vesto-hokaro ; KLIENTO sidiĝas ; SUZANA eliras tra la flanka pordo, kaj preskaŭ tuj revenas.)

SUZANA. — Sinjoro, la dentisto nun prizorgas klientinon, sed li vin prenos tuj poste.

KLIENTO. — Kio estas tuj poste ? Ĉu post kvin minutoj ?

SUZANA. — Ho ! ne, Sinjoro ! Post unu horeto !

KLIENTO. — Post unu horeto ! Ho ! Sed kion li faradas al tiu klientino ?

SUZANA. — Nu, se mi bone memoras — mi babilis kun ŝi dum ŝi atendis (ŝi kalkulas sur siaj fingroj). Unue, la dentisto devas...

KLIENTO. — Ho ! Sciu, mi tute indiferentas pri ŝi ; nur pri mia dento mi pensas.

SUZANA. — Jes, ĝi ŝajne tre doloras.

KLIENTO. — Al mi ne ŝajne : vere ! Estas infero.

SUZANA (kompate). — Malfeliĉa sinjoro ! Kion mi povas fari por vi ?

KLIENTO. — Nenion povas fari vi ! Nur la dentisto povas fari ion... almenaŭ mi esperas !

SUZANA. — Ho ! Li certe faros ion... li estas bonega dentisto. La lastan semajnon ankaŭ mi suferis pro dento ; li tuj sanigis min ; tuj ! Kaj tio kostis al mi nenion ! Ĉar mi laboras ĉe li, li ne pagigis min ! (ŝi ekridas).

(Serioza kaj kompata) Ha ! Mi scias, al vi ne estos same ; vi devos pagi. Ja malagrabla estas tio : ĉe la dentisto, oni suferas, kaj krome tio kostas monon. Vi certe preferus elspezi tiun monon en kinejo, ĉu ne ? Anstataŭ suferi, vi amuziĝus ! Kaj tio ne kostus al vi pli la mono ! Kontraŭe, tio certe kostus al vi malpli da mono... ĉar karaj estas la dentistoj !

Kion vi pli bedaŭras : ĉu la doloron... aŭ la monon ?

KLIENTO. — Mi bedaŭras ambaŭ ! Tiu, kiu neniam havas dento-doloron ja estas feliĉa !

SUZANA. — Jes ja ! Nu, tion ni ne povas elekti, ĉu ?

KLIENTO. — Ne, tion ni ne povas elekti... (suferas) Ho !

SUZANA. — Ha ! Vi ne havas ŝancon ! Tiom suferi dum (ŝi montras la fenestron) tiom bela tago ! Anstataŭ promeni sub la suno, vi devas sidi tie ĉi, suferante...

KLIENTO. — Vi pravas ! Mi ne havas ŝancon !

SUZANA. — Kaj poste, vi sidos en la kuraco-ĉambro, kaj tiam vi eĉ pli suferos, ĉar doloriga estas la dentista frezilo — vi scias tion, ĉu ne ?

KLIENTO. — Ho, jes !

(SUZANA pašas tien kaj reen, videble ne sciante kion fari por KLIENTO).

SUZANA. — Ho ! Mi alportu al vi revuojn ; tio helpos vin pasigi la tempon... (ŝi eliras tra la flanka pordo, tuj revenas kun revuoj ĉemane ; ŝi metas ilin sur la tableton).

KLIENTO. — Dankon ! (li prenas revuon, trafoliumas ĝin, dum SUZANA varte rigardas lin ; li remetas la revuon sur la tableton).

SUZANA. — Vi ne legas, Sinjoro ? Tiu revuo ne interesas vin, ĉu ?

Ho ! Vi tro suferas por koncentriĝi sur la legado. Jes, tio ofte okazas al la klientoj... ili pensas nur pri la doloro, pri nenio alia.

KLIENTO. — Ĉu la dentisto ne povas iom rapidi pri la klientino ? Iru demandi !

SUZANA. — Mi tre bedaŭras, Sinjoro, sed tion mi ne rajtas ; la dentisto nepre malpermesis al mi ĝeni lin, kiam li prizorgas klienton.

Komprenu, Sinjoro, ke mi ne deziras malplaĉi al li ; mi ne volas perdi mian laboron ! Mia patro estas malsana, mi devas labori por helpi lin ; mi ne povas riski esti maldungita ! Vi komprenas tion, ĉu ne, Sinjoro ?

KLIENTO. — Mi komprenas tion ; sed mi ankaŭ komprenas, ke mi suferas kiel mil diabloj !

SUZANA. — Ha ! Sinjoro, vi ne devas ĉiam pensi pri via dento ; klopodu pensi pri io alia ; mi scias, tio ne forigos la suferadon, sed vi iom forgesos ĝin ; kaj, se vi forgesos ĝin, vi malpli suferos.

Nu ! (ŝi sidiĝas apud li) Mi provos vin distri ; ni babilu ! Pri kio ni povas babili, por helpi vin forgesi la suferadon ? (ŝi pensas).

Sinjoro, ĉu de longa tempo vi loĝas en tiu ĉi urbo ?

KLIENTO. — De du jaroj.

SUZANA. — De du jaroj ! Do, vi certe bone konas ĝin. Mi estas ĉi tie de nur tri monatoj ; antaŭe mi vivis en la kamparo ; miaj gepatroj havas farmeton, kun bovinoj, kokinoj, kaprinoj... Mi amas bestojn ; ĉu ankaŭ vi amas bestojn ?

KLIENTO. — Jes, mi amas bestojn.

SUZANA. — Ha ! Bone ! Ankaŭ vi amas bestojn ; same kiel mi ! Kiajn bestojn vi prefere amas ?

KLIENTO. — Mi amas iajn ajn bestojn.

SUZANA. — Vi amas iajn ajn bestojn ! Do, vi devas esti tre malfeliĉa vivi en urbo, ĉar en urbo ne estas bestoj. Kial, do, vi elektis vivi en urbo ?

KLIENTO. — Mi ne elektis vivi en urbo ; mi devas vivi en urbo, ĉar nur en urbo mi trovis laboron.

SUZANA. — Ha ! Same kiel mi ! Mi devas vivi en urbo, por labori, por gajni monon, por sendi la monon al la malsana patro, kiu tre bezonas ĝin, ĉar pro la malsano li ne plu povas labori, kaj la kuracado kostas multe, multe da mono ; malfeliĉa patro !

Mi esperas, ke la patro baldaŭ resaniĝos ; tiam mi povos reiri al la kamparo, kaj promeni tra la agroj, kaj vidi bestojn, kaj aŭskulti la kantojn de la birdoj...

En la kamparo estas multaj, multaj birdoj, kiuj belege kantas, kaj kiuj havas belajn kolorajn plumojn.

Ĉu ankaŭ birdojn vi amas ?

KLIENTO. — Jes, ankaŭ birdojn mi amas.

SUZANA. — Ankaŭ birdojn vi amas ! Do, vi devas esti tre malfeliĉa vivi en urbo, ĉar en urbo ne estas birdoj.

Ho ! Jes, estas birdoj en kaĝoj... Sed mi ne amas vidi kompatindajn birdojn enkarcerigitaj en kaĝoj ! Mi

amas vidi birdojn, kiuj libere flugas.

Iam, ĉe la lago, mi kredis vidi birdon ; sed ne estis birdo, estis vesperto. Vesperto ne estas birdo, estas mamulo ; ĝi havas dentojn !

KLIENTO (grimacas). — Haaaaaaa !

SUZANA. — Ho ! Pardonu al mi, Sinjoro ! Mi volis distri vin, helpi vin forgesi tiun malbonan fi-denton, kiu tiom suferigas vin, kaj mi parolis pri dentoj !

(Paŭzeto ; SUZANA pensas)

SUZANA. — Sinjoro, ĉu vi iam supreniris al la Verda Monto, por vidi la urbon de supre ?

KLIENTO. — Jes.

SUZANA. — Estas bela vidaĵo, ĉu ne ? Precipe kiam la vetero estas bela ; kompreneble oni ne devas iri tien kiam pluvas, aŭ nebulas.

Ĉi iris tien la lastan semajnon, per la fervojeto... ĉu ankaŭ vi iris per la fervojeto ?

KLIENTO. — Jes.

SUZANA. — Amuza fervojeto, ĉu ne ? ĝi ne estas kiel la aliaj fervojoj ; pro la deklivo, estas, inter la du reloj, tria relo kun dentoj.

KLIENTO (grimacas). — Haaaaaaa !

SUZANA. — Ho ! Denove mi, senatente, senpripense, parolis pri dentoj ! Stultega mi !

Vi daŭre suferas pro via malbona dento, ĉu ne ?

KLIENTO (kolere). — Jes ja, mi daŭre suferas ! Jen idiota demando ! Se mirakle forsvenus mia dento-doloro, mi tuj reirus hejmen, kredu min ! Ne kiel tempo-pasigilo mi vizitas dentiston !

Mi pli kaj pli suferas ! Mi suferas ĝis morto !

SUZANA (maltrankviliĝas). — Ho ! Mi esperas, ke vi ne mortos ! La dentisto estus tre malkontenta se vi mortus !

KLIENTO. — Mi kredas, ke mi estus pli malkontenta ol li !

SUZANA. — Jes ja ! La dentisto povos trovi aliajn klientojn, sed vi ne trovus alian vivon.

KLIENTO. — Ĉu vi vere ne povas diri al via mastro, ke mi ne plu povas atendi ?

SUZANA. — Ne, Sinjoro, ne ! Tion mi jam klarigis al vi : li maldungus min, kaj mi ne povas perdi mian laboron...

KLIENTO. — Jes, pro la malsana patro !

SUZANA. — Kion mi povas rakonti al vi, por helpi vin forgesi... ?

Sinjoro, ĉu vi havas aŭton ?

KLIENTO. — Jes !

SUZANA. — Mi ne havas aŭton ; aŭto kostas multe da mono, kaj mi ne povas aĉeti unu ; mi devas sendi la monon, kiun mi gajnas, al la malsana patro, por ke li povu pagi bonegan kuraciston, kaj rapide resaniĝi. Do mi ne havas monon por aĉeti aŭton ; iamaniere mi ne scipovas stiri aŭton ; ĉu vi scipovas stiri aŭton ? Jes, se vi havas aŭton, vi certe scipovas stiri aŭton ; estus senutile havi aŭton, se oni ne scipovas stiri aŭton.

Estas tre malfacile stiri aŭton ; iam mi provis stiri la aŭton de mia kuzo ; li havas aŭton tre malgrandan, sed tamen estas aŭto ! Nu, mi neniam sukcesis ŝanĝi rapidon sen grincigi la dentojn !

KLIENTO (grimacas). — Haaaaaaa !

SUZANA. — Dio mia ! Kiel okazas, ke mi ne povas babili pri io ajn, sen eldiri la vorton « dento » ?

Tre ĉagrenas min vidi vin tiom suferanta (ŝi stariĝas kaj alproksimiĝas al li). Kion mi povas fari por mildigi vian suferadon ? Eble... se vi kuŝos... ĉu vi volas tion provi ? (ŝi helpas lin kuŝiĝi). Mi metos kusenon sub vian kapon (tion ŝi faras ; ŝi prenas liajn krurojn kaj metas ilin sur seĝon ; ŝi demetas liajn ŝuojn). Vi ne devas malvarmiĝi ! (ŝi etendas koverton sur liajn piedojn). Jen, jen ! ĉu vi estas pli bone tiel ?

KLIENTO. — Estas same ! (li grimacas) Hooooooooo !

SUZANA. — Ha ! Sinjoro, klopodu iom elteni la doloron ! Vi ne estas knabineto, vi estas viro ! Vera viro estas kuraĝa ! Montru, ke vi estas vera viro, ne ĉiam plendu kaj ĝemu ! Povran bildon vi donus al via edzino, se ŝi vidus vin !

KLIENTO. — Tion mi ne riskas, edzinon mi ne havas !

SUZANA. — Do, vi estas fraŭlo ?

KLIENTO. — Se mi ne havas edzinon, tio signifas, ke mi estas fraŭlo !

SUZANA. — Tamen, vi ne plu estas juna ; kial vi ankoraŭ ne edziĝis ?

KLIENTO. — Nu, ĉar hazardo neniam metis sur mian vojon virinon edzinigotan.

SUZANA. — Ha ! Mi scias ! Al mi okazis same ; mi neniam renkontis viron por edziniĝi al li, malgraŭ ke mi ja deziras edziniĝi ; mi amus havi edzon, kaj infanoj...

KLIENTO. — Nu, ankaŭ mi deziras edziĝi ; vi estas fraŭlino, mi estas fraŭlo ; ambaŭ ni deziras edziĝi ; ni kune geedziĝu ! ĉu vi konsentas ?

SUZANA. — Ha ! Sinjoro ! Vi ja kuras al celo ! Vi ĵus renkontis min, kaj jam vi petas mian manon !

KLIENTO. — Mi ne ĵus renkontis vin ; jam de kelka tempo mi konas vin ; plurfoje mi vidis vin en la strato. Kaj — ĉu vi ne memoras ? — mi iam alparolis vin : mi demandis al vi la vojon al la urbodomo !

SUZANA. — Ho ! Estas vi ! Jes, mi memoras !

KLIENTO. — Mi estas serioza viro ; mi ne drinkas, mi ne fumas, mi havas bonan salajron. Mi povas fari edzinon feliĉa !

SUZANA (suspekteme). — Ŝajnas, ke vi pli bone fartas ; ke via dento ne plu turmentas vin !

KLIENTO (rektiĝas kaj remetas la ŝuojn). — Fraŭlino, mi devas konfesi al vi : mi neniam havis dento-doloron ! Sed de kiam mi ekkonis vin, ĉiun nokton mi pensas pri vi, mi revas, mi sonĝas pri vi.

Hieraŭ, mi sekvis vin ĝis tie ĉi, kaj de la pedelino mi eksciis, ke vi estas servistino ĉe dentisto. Do, por povi paroli al vi, mi...

SUZANA (subite kolera). — Vi inventis la dento-doloron !

KLIENTO. — Mi ne eltrovis alian rimedon...

Fraŭlino, mi amas vin ; ĉu vi konsentas edziniĝi al mi ?

SUZANA. — Ha ! Certe ne ! Mi neniam konsentos edziniĝi al mensoganto !

KLIENTO. — Mi ne estas mensoganto !

SUZANA. — Vi ne estas mensoganto ? Jam de duonhoro vi ludas al mi komedion, mi kompatas vin, mi flegas vin, kredante, ke vi terure suferas, kaj ĉio tio estas honta trompo, kaj vi kuraĝas diri al mi, ke vi ne estas mensoganto !

KLIENTO. — Sed, Fraŭlino, tion mi faris por...

SUZANA (malfermas la fonan pordon kaj montras la elvojon al KLIENTO). — Tuj foriru, Sinjoro ! Kaj ne plu al mi demandu la vojon al la urbodomo !

KLIENTO (pete). — Fraŭlino !

SUZANA. — Foriru !

KLIENTO. — Bone !

(KLIENTO eliras ; SUZANA fermas la fonan pordon).

SUZANA (sola). — Jen aplombo ! (ŝi paŝas tien kaj reen, iom post iom mildiĝas, eĉ ridetas).

Tamen, li estas agrabla viro ; ne verdire bela, certe, sed ne malloga...

(Iu sonoras ĉe la fona pordo ; SUZANA tuj denove koleras).

Ha ! Se estas denove li, mi vangofrapos lin ! (ŝi malfermas la fonan pordon).

KLIENTO (ĉe la sojlo). — Pardonu al mi, Fraŭlino, mi forgesis la ĉapelon.

SUZANA (prenas la ĉapelon kaj abrupte metas ĝin sur lian kapon). — Jen via ĉapelo, Sinjoro !

Adiaŭ, Sinjoro !

KLIENTO. — Adiaŭ, Fraŭlino !

(SUZANA klakfermas la fonan pordon ; paŭzeto ; ŝi hezitas, paŝas al la fona pordo, retropaŝas, finfine malfermas la fonan pordon, eliras, pete vokante).

SUZANA. — Sinjoro ! Sinjoro !

FINO

POR VIA DISTRO

SOLVOJ DE LA ANTAŬAJ PROBLEMOJ

Ĉu estas eble ?

Tiu frazo ne estas korekta : La razisto ne sin razas ĉar li razas ĉiujn virojn kiuj ne sin razas. Li ne estas razita de alia ĉar, en la vilaĝo, ekzistas nur du kategorioj de viroj : tiuj kiuj sin razas, kaj tiuj kiuj estas razitaj de la razisto. Konklude, la razisto ne estas razita. Do, la unua parto de la frazo kiu diras ke neniu viro portas barbon ne estas ebla. (Tiu problemo esti proponita de la filozofo Bertrand Russel).

Al kiu apartenas la zebro ?

Estu 1 2 3 4 5 la numeroj maldekstre dekstren de la 5 domoj. Ni scias :

La Norvego loĝas en 1 (propono 10).

La dua domo estas blua (proponoj 15 kaj 10).

Oni trinkas lakton en la tria (propono 9).

La verda domo staranta dekstre de la ebura kaj la angla domo estante ruĝa (proponoj 6 kaj 2), la unua domo estas flava.

Do la « Gauloises » fumanto loĝas en la unua domo (propono 8).

La ĉevalo estas en la dua (propono 12).

Laŭ la proponoj 4, 5, 9 kaj 13 *la Norvego trinkas akvon.*

La unua domo estante flava, la dua blua, la verda starante dekstre de la ebura, la tria domo nur povas esti ruĝa aŭ ebura.

SE la tria domo estas ebura ni havus :

La verda domo en 4 (propono 6).

La kaftrinkanto en 4 (propono 4).

La 5a domo estas ruĝa kaj la Anglo loĝas en ĝi (propono 2).

La rusa tetrinkanto devus loĝi en la 2a domo kaj la « Lucky Strike » fumanto trinkante oranĝan sukon loĝus en la 5a aŭ inverse.

Do la « Old Gold » fumanto povus nur loĝi en la 3a aŭ la 4a domo. Tio malhelpas loki la Hispanon kaj lian hundon, lokinte la Japanon kaj liajn « Gitanes ».

Do, la tria domo estas ruĝa kaj la Anglo loĝas en ĝi (propono 2).

La 4a domo estas ebura kaj la 5a verda kaj oni trinkas kafon en ĝi.

La 2a povante esti loĝata nek de la Japano ĉar neniu trinkaĵo estus ebla en tiu domo, nek de la Hispano pro la hundo, apartenas al la Ruso.


Do la « Lucky Strike » fumanto loĝas en la 4a domo, la Japano, « Gitanes » fumanto, en la 5a, la Hispano kaj la hundo estas en la 4a, la helikoj kaj la « Old Gold » fumanto en la 3a, la « Chesterfield » fumanto en la 2a, la vulpa proprietulo en la 1-a kaj la zebra proprietulo en la 5a.

Do *la zebro apartenas al la Japano.*

DIVIDO PRESKAŬ SEN CIFEROJ

Oni devas rimarki ke estas 7 ciferoj je la dividota nombro, 2 je la rezulto, kaj 5 je la dividanta nombro (kun 8). Sub la dividanta nombro estas nur tri substraktoj kaj du foje oni devis preni du cifero jn. La dua kaj la kvara ciferoj de la rezulto estas do 0. Se oni multoblas la dividanton per 8 oni trovas duciferan nombron. La dividanto estas pli malgranda aŭ valoras 12. Sed la dua cifero de la rezulto multobligita per la dividanto estas tricifera nombro. La dividanto povas esti nur 12 kaj la lasta cifero de la rezulto 9. La unua cifero de tiu rezulto ankaŭ estas 9 ĉar multobligante ĝin per 12 oni trovas nombron kun tri ciferoj. Oni povas retrovi la dividotan nombron jene (90 809 . 12) + 1 = 1 089 709.

NOVA PROBLEMO



Horizontale :

1) Sensaj organoj — instrumento.
2) Akva besto — muzika instrumento (radiko).
3) Parto de rakonto — japana ludo (radiko).
4) Ne ĉie — telefona interjekcio — persona pronomo inversia.
5) Frukto — participo.
6) Atriplo (radiko).
7) Tiri al — pri kio sopiras la junulinoj.
8) Serpento (radiko) — sufikso — el kio devenas la virinoj (radiko).
9) Mezo.
10) Kolektiva — universa principo — ŝi manĝis herbon (radiko).

Vertikale

A) Sensa organo — Kristarbo.
B) Soldato.
C) Sola — tedita.
D) Romboforma objekto.
E) Vestpeco (radiko).
F) Tirolkanto — participo.
G) Metalo miksita — litero.
H) Transitiviga sufikso — aro da instrumentoj.
I) Pruvi per dokumento.
J) Sonfiguro.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

UL - AN (Difino P.V.)

UL **kun diversaj radikoj :**

ĝibulo, altrangulo, posteulo, tieulo, duulo.

[RIM] UL estas superflua ĉe pasivaj verboj (ĉar, pro konvencio, ITO - ATO - OTO montras personon)

— konato — instruito (anstataŭ konatulo, instruitulo).

AN montras

— **loĝanton** (ne naciecon) : « germanoj kaj francoj, kiuj loĝas en Rusujo estas Rusujanoj kvankam ili ne estas Rusoj ».

— **membron de klubo :** klubano — senatano.

— **adepton de doktrino :** oni uzas ANO aŭ ISTO, laŭ la naciaj kutimoj : Kristano - Budaisto.

— **montras simpatiantojn pli ol agemulojn** (esperantano — esperantisto).

— **apartaj sencoj :** policano — policisto.



Spektaĵoj

Mi ne komprenas kial vi protestas ankoraŭ unufoje ! Mi jam formetis mian ĉapelon. Cetere mi ne volas formeti mian perukon, ĉar mi ne volas montri min senharulo kiel vi !



Vidpunkto

Kia bela pejzaĝo ! Kia freŝa aero ! Kia bonfara trankvileco ! Kial oni ne konstruas grandan urbon ĉi tie ? Imagu la feliĉon de la urbanoj, de la dungitoj, de la kampuloj !



Kontestado

Li estas la plej juna sed la plej bruema ano en sia klubo, kiu propagandas por la egaleco de la rajtoj. Ĉar li rifuzas trinki porinfanan limonadon alportu du aperitivojn.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (80 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (160 fr.).

Britujo : S-ro John Rapley, 156, Wanstead Park Rd., ILFORD, Essex IGI 3 TP, ĝiro 50 292 3008 (160 p.).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (25 kr.).

Finnlando : S-ro Jussi Jäntti, Esperantotie 4, SF 02220 IRISLAHTI (16 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (10 mk.).

Hispanujo : S-ro Manuel Romero Gomez, Arzobispo Apaolaza, 32-Ent. A ZARAGOZA (240 pes.)

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Affieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (2 000 lires).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (1 200 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (60 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (10 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (24 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Rumanio : S-ro Adrian Boldan, al. Valea Rosie 4, ap. 69, B.P. 8/4 BUKURESTI - 66.

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 233 Rostov Don — 7.

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (18 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (14 fr.).

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO Box 1231, BANGKOK (5 us. dol.).

Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (5 dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respondkuponoj (20 respk.).



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anonciatajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier — Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 1 de 1975, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Hiver jusqu'ici sans histoire, très calme, trop calme peut être puisque Grésillon a dormi. Et nous avec Grésillon pour faire le point. Ce qui nous a confirmés dans notre idée d'attendre un peu avant d'engager des dépenses importantes. Les disponibilités nous permettraient quelques travaux mais l'incertitude qui demeure quant aux résultats de 1975 nous oblige à la prudence ; il faut de toute façon faire face aux dépenses constantes, celles qui ne varient pas avec les recettes, auxquelles il faut faire face de toute manière.

Il n'y a pas de déferlement d'inscriptions jusqu'à maintenant pour la période de Pâques. Le congrès de U.F.E. et celui de SAT-Amikaro sont probablement une gêne. Mais il n'y a pas loin de Tours ou de St-Junien à Baugé. Grésillon est le lieu idéal pour se reposer des fatigues d'un congrès... ou pour se préparer à affronter ces fatigues. Nous sommes assurés pour cette période de la participation d'une vingtaine d'enfants et d'adultes dont quelques étrangers. Et d'ici à Pâques...

Pour l'été, comme l'an dernier, les inscriptions ne viennent que très lentement. Jusqu'en juin vraisemblablement nous ne saurons pas ce que sera vraiment la saison. Il serait cependant souhaitable de prévoir longtemps à l'avance certaines dispositions matérielles, en particulier en ce qui concerne le personnel.

Enfin, quoi qu'il en soit, c'est sur vous tous que nous comptons pour faire connaitre nos activités autour de vous, à vos correspondants. C'est sur vous que nous comptons pour organiser des voyages de groupes à Grésillon en avril, mai ou juin. Merci.

P. BABIN.

LA REVUE

Les abonnements arrivent régulièrement, et beaucoup d'entre nos amis souscrivent un abonnement bienfaiteur, un abonnement double, ajoutent une somme au prix de l'abonnement ou abonnent des amis ou des correspondants. Que tous ceux qui le peuvent fassent ce geste. Nous les en remercions.

ABONNES BIENFAITEURS

M. Doury (93)	50,00
Mme Humm (84)	20,00
S-ro Mee (Pays-Bas)	20,00
M. Guillaume (78)	20,00
Mlle Leclercq (80)	30,00
M. Goudé (49)	20,00
M. Bourquin (25)	20,00
M. Curnelle (59)	20,00
M. Pons (09)	20,00
M. Robert (13)	20,00
M. Saint-Marc (33)	50,00
S-ro Schrapp (Allemagne Fédérale)	20,00
M. Drezet (25)	20,00
M. Pallard (72)	20,00
M. Turbellier (44)	20,00
Mme Bentz (31)	20,00
M. Fort (56)	20,00
M. Valluet (45)	20,00
Mlle Sueur (62)	20,00
Mme Bourgeois (Suisse)	30,00
Mlle Meunier (45)	35,00
M. Binche (37)	20,00
M. Genuit (10)	20,00
M. Fort (10)	20,00
M. Lahaye (10)	20,00
S-ro Tumbas (Yougoslavie)	20,00
S-ro Heine (Pologne)	20,00
S-ro B. Nagy (Hongrie)	20,00
M. Canet (89)	20,00
M. Duflot (59)	20,00
M. Chasseriaud (17)	20,00
S-ro I. Nagy (Hongrie)	20,00
M. Bénistant (72)	20,00
Club retraités ens. (72)	20,00
Mlle Tréanton (22)	20,00
M. Cambillard (09)	20,00
Mme Cantel (17)	20,00
Mme Marbœuf (49)	20,00
M. Kraemer (54)	20,00
Mlle S. C. Kraemer (68)	40,00
M. Kubler (68)	20,00
M. Debertonne (78)	20,00
M. Serre (66)	50,00
M. Bourdelon (13)	20,00
M. Cadenel (13)	20,00
M. Garrigue (13)	20,00
Mme Jurquet (13)	20,00
M. Lorenzin (13)	20,00
M. C. Martin (35)	20,00
M. Eyssautier (69)	20,00
Mme Horault (49)	20,00
Mme Rossignol (61)	20,00
M. Laurent (16)	20,00
M. Riou (76)	20,00
M. Gimbert (19)	20,00
M. Melo (37)	20,00
M. Baronnet (36)	20,00
Mme Leduc (44)	20,00
Mme Desnos (53)	20,00
S-ro Schütt (Allemagne Fédérale)	100,00

S-ino Eggers (Allemagne Fédérale)	100,00
Mlle Tulasne (49)	20,00
Maison des Jeunes-Cenon (33)	20,00
Mme Hautier (34)	20,00
Mlle Ternal (34)	20,00
M. Martinez (16)	20,00
M. Ligot (22)	20,00
S-ro Gucz (Pologne)	20,00
Mme Stutzmann (68)	20,00
M. Kristos (63)	20,00
M. Lanz (93)	20,00
S-ro Kremlacek (Tchecoslovaquie)	20,00
M. Hervouet (92)	30,00
Mme Boyet (49)	20,00
Mme Pellerin (49)	20,00
M. Marmou (77)	20,00
S-ino Flach (Pays-Bas)	30,00
S-ro de Waard (Pays-Bas)	20,00
Mme Villanova (13)	20,00
M. Masclet (06)	20,00
M. Batailler (06)	20,00
Mlle Bonafous (13)	20,00
M. Carlué (13)	20,00
M. Julien (13)	20,00
M. Martinez (13)	20,00
M. Siarri (13)	20,00
M. Motto (06)	20,00
Mme Bariteaud (06)	20,00
M. Gerrier (75)	20,00
M. Olivaux (44)	20,00
M. Philippeau (44)	40,00
Mlle Laporte (25)	20,00
M. Simonet (47)	25,00
M. Moreau (33)	20,00
Mlle Clavier (69)	20,00
M. Comadran-Dalmau (04)	25,00
M. Mak-Edery (06)	20,00
Mme Guillot (74)	75,00
M. Dieusaert (92)	20,00
Mme Chaumereuil (93)	20,00
M. Prevot (44)	20,00
S-ro Adnadj (Yougoslavie)	20,00
Mme Reyneau (49)	20,00
S-ro Rapley (Grande-Bretagne)	22,00
Mlle Chatelus (69)	20,00
Mlle Raulet (44)	20,00
M. Tragin (27)	20,00
M. Veron (61)	20,00
S-ro Slot (Pays-Bas)	20,00
Mme Bidet (03)	20,00
M. Steinmetz (67)	20,00
Mlle Lemonnier (92)	50,00
M. Despiney (94)	25,00
Mlle Davoust (53)	20,00
TOTAL	**2 727,00**

NOS JOIES

Chez nos amis Kimie et Raif Markarian est née une petite fille au début de l'année. Nos félicitations aux parents et bienvenue à la nouvelle espérantiste.

Maison Culturelle Espérantiste

Programme 1975

PAQUES

1) — **Arrivée Dimanche 23 Mars. — Départ Samedi 29 Mars.**

Rencontre de jeunes espérantistes de différents pays

(Enfants de 9 à 13 ans accompagnés)

Cours — Activités diverses

Pour les adultes : « Pédagogie de l'Espéranto »

Causeries — Débats — Cours suivis de discussions — Soirées récréatives

2) — **Arrivée Dimanche 30 Mars. — Départ Samedi 5 Avril.**

Pratique et expression

Pratique de la langue — Grammaire et expression — Soirées récréatives

ETE

1) — **Arrivée Mardi 1er Juillet. — Départ Lundi 21 juillet.**

Semaines Esperantistes

Cours des 3 degrés — Examens — Activités manuelles.
Excursions et visites — Soirées récréatives.

2) — **Arrivée Mardi 22 Juillet. — Départ Lundi 11 Août.**

Semaines Internationales

Conférences. — Discussions. — Excursions — Soirées récréatives.

3) — **Arrivée Mardi 12 Août. — Départ Lundi 1er Septembre.**

Semaines d'Etude

Cours des 3 degrés — Examens — Activités manuelles.
Excursions et visites — Soirées récréatives.

Inscriptions rapides conseillées à :

MAISON CULTURELLE ESPÉRANTISTE
Château de Grésillon - 49150 BAUGÉ